BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1.182
Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

*Nº 16 - JUNHO DE 1976 ---- BOLETIM INFORMATIVO*

*Redatora resp.: - MARIA ALMADA - Endereço:-Santos.*

## ESPERANTO OFICIALIGITA

Lia ekselenca Moŝto, D-ro JOÃO MUNIZ RIBEIRO, rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fôra (MG), rekoninte la valoron de Esperanto post esplorado farita de altnivela Komisiono, de li nomita, decidis enkonduki la instruadon de la Internacia Lingvo en la Beletran Departementon de la Universitato.

Tiu atingo estas la rezulto de la klopodoj de la prezidanto de BKE ĉe la federaciaj instancoj kaj persista laboro de nia vicprezidanto, katedra profesoro pri lingvoj, samideano José Passini, kiu organizas kaj gvidos la disciplinon, realigante tiel la deziron de 600 gelernantoj, kiuj subskribis peton volante lerni Esperanton.

Samideano Passini informis:
"ESPERANTO EN UNIVERSITATO Esperanto I kaj Esperanto II estas la plej novaj lernobjektoj de Beletra Departemento de la Federacia Universitato de Juiz de Fôra, laŭ la Rezolucio 15/76 de la Supera Universitata Konsilantaro, kies kunveno okazis en la 4-a de Junio. La Internacia Lingvo estos instruata kiel ordinara lernobjekto de la nomita Departemento, en la sama nivelo al la aliaj fremdaj lingvoj".

## O ESPERANTO NO BRASIL

(Continuação do ensaio histórico complilado por Nelson Pereira de Souza)

Tudo isso é a resultante da entrada em cena de uma plêiade de novos esperantistas de valor, qual mais competente, qual mais dedicado: afora os já ci-

tados, temos Nuno Baena, A. Couto Fernandes, "a máquina de coser silenciosa" Lauriano das Trinas, Venancio da Silva, Arlindo de Souza, Daltro Santos, Haroldo Amaral, Francisco de Almeida Jr., Quirino de Oliveira. J.B. Mello e Souza, Arruda Beltrão, Alekso Fanzeres, Severino de Freitas, Nerval de Gouveia, Julia Fernandes, Irene A. Santos, Irany Baggi de Araújo, "Fraŭlinoj" Bloomfield, Honorio Leal, Pedro Alvares Coutinho, J. Duarte da Silveira, E. Tribouillet, Paulino Santiago, Portocarrero Netto, Carlos Domingues, Carlos Velloso, Alcebíades C. Paes, Moreira Guimarães, Methodio Maranhão e tantos outros mais, que, com sua colaboração pessoal, concorreram para a vida do Esperanto, na medida de suas possibilidades.

"Nia forteco ne estas la merito de iu aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multjara pacienca laborado de multo da personoj", disse Zamenhof em 1908, no Congresso de Dresde.

---------

Nota de I.G.B.-(5) Esses trabalhos, como outros que os sucederam, ocupam lugar respeitável e glorioso na história do Esperanto no Brasil, porque tiveram a virtude de conservar acêsa a lâmpada do esperantismo; mas foram impressos por particulares, sem recursos de divulgação dos livreiros profissionais, por isso alcançaram um público muito limitado e não tiveram a fôrça de renovar o movimento. Uma campanha cultural como a do Esperanto não pode prescindir da colaboração permanente de livrarias editoras que apresentem séries continuadas de obras de diversos autores durante anos consecutivos.

---------

Sobre os primeiros tempos, informa Ismael Gomes Braga, no seu livro "Veterano?":

"A primeira entidade esperantista, no Brasil foi o Grupo Esperantista "Suda Stelaro", fundada em Campinas (SP), em 17 de março de 1906; seu primeiro presidente foi o Dr. João Keating e o vice-presidente, o engenheiro Tobias Rabello Leite, que escreveu os primeiros dicionários Esperanto-Português e Português-Esperanto, impressos pela firma Hachette & Cia., de Paris.

A segunda sociedade fundada no Brasil ainda vive, é o "Brazila Klubo Esperanto", organizado em 29 de junho de 1906, cuja pri-

meira diretoria foi: Presidente, Dr. Everardo Backeuser; 1º Vice-Presidente, Dr. Nuno Baena; 2º Vice-Presidente, Nerval Gouveia; Secretário, Major Lauriano Trinas; Tesoureiro, Honorio Leal.

(Continua)

MONDONACOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la malavarajn kontribuojn de la jenaj gekunlaborantoj, al kiuj ni el tuta koro dankas:

| | |
|---|---|
| Mauro Azevedo....... | 50,- |
| Dirceu Prociuncula.. | 180,- |
| Tuto ..... | 230,- |

---

RICEVITAJ GAZETOJ

Tribuna de Indaiá, Tribuna de Lavras, Esperanto Aldono, O Taubateano, Correio Fraterno do ABC, Viver Bahia, kiuj akurate disvastigas nian idealon. Gratulon!

NIAJ SCIIGOJ ...

BRAZILIO - Nia redakcio ricevis informojn, ke la ĉijara Seminario de Esperanto malsamos de la jam kutime organizitaj. La urbestro de la ĉefurbo ne nur apogos sed ankaŭ patronos la eventon.

La gastigado okazos ĉe milita polico por la delegitoj kaj vicdelegitoj, inkluzivante transportadon senpage.

Estas anoncita karavano el Eŭropo. Kelkaj personoj el Usono, geamikoj de nia redaktorino intencas partopreni la Seminarion, kio, laŭŝajne estos por nia nova ĉefurbo vera inaŭguro rilate la ĉeeston de pluraj esperantistoj naciaj kaj eksterlandaj.

Ĵen kial ni esperas, ke niaj gesamideanoj partoprenos tiun festan kunsidon amase.

Aliĝu ni do por briligi kaj grandigi nian movadon, ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj-Poŝtkesto Nº 1887-ZC 00 aŭ Av. 13 de Maio, 47-sobreloja 208- 20.000- Rio de Janeiro (RJ).

------xxxxxx-------

RIO DE JANEIRO - Brazila Esperanto-Ligo okazigos Simpozion en la 3-a de Julio venonta en sia sidejo.

RIO DE JANEIRO (RJ)-S-ano Lazarus Brieger sendis al ni sciigon pri okazigita renkonto en la 12-a de junio 1976-a ĉe Fondaĵo Konrad Adenauer.

La Fondaĵo estas kultura helporganizaĵo kaj ĝia direktoro interesiĝas pri

Esperanto.

Laŭ nia s-ano Brieger, la Fondaĵo eble organizos kurson, ĉe privataj lernejoj kaj eble ĉe la TV kanalo 2, kaj ankaŭ kurson por la skoltoj.

S-ano Brieger samtempe asertas, ke la Ligo kaj la Kooperativo de Esperantistoj post 20—jara nekomprenemo decidis finfine kunlaboradi kaj amikiĝi. La sciigo nin ĝojigas kaj kiel ĉiam nia BKE plezure daŭrigas la kunlaboradon kun ambaŭ organizaĵoj al kiuj ni kore deziras sukceson kaj gratulas al nia brava batalanto Lazarus Brieger pro tiom alt stara laboro.

------ xxxxx-------

Ni permesas represadon de niaj sciigoj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

----- xxxxxx--------

Same kiel Esperanto, nia Informa Bulteno estas absolute neŭtrala !

## LIÇÕES PARA UM RETIRO ESPIRITUAL

Antonieta Almada Miranda

CARIDADE - Para realizá-la realmente tenhamos sempre um sentido vertical, elevando nosso amor a Deus.

Comumente em nossa vida costumamos celebrar com alegria uma data do ano: o aniversário do nosso nascimento.

Uma data, porém, muito mais importante, de interêsse primordial para nós é olvidada: a data do nosso Batismo. Na verdade ignoramos completamente essa efeméride !

Não deveria ser assim entretanto. O Batismo marca definitivamente para nós o caráter de filhos adotivos de Deus.

Membros da Família Divina da S.S. Trindade.

Paralelamente com o caminho da vida humana que termina com a morte, devemos trilhar a caminhada para a vida que jamais finda, destino supremo da nossa alma : Deus.

Mistér se torna que durante êsse interregno, nos realizemos aquí na terra, condição a nós imposta pelo Pai Celeste. Cumpre assim que passemos nossa vida terrestre nos preparando diuturnamente para a morada celeste. Como ?

Seguindo pura e simplesmente os deveres ditados pela nossa filiação divina.

Servindo e amando nosso irmão, vendo nele a figura

do Crucificado que morreu por nosso amor.

Obedecendo às determinações da Igreja, recebendo os sacramentos de Cristo, imitando os magníficos exemplos que nos legou na sua passagem pela terra.

Tudo isso nos levará, pela misericórdia divina, a contemplar um dia e para todo o sempre a face do Supremo Criador do Universo: DEUS!

(Da revista Voz de Ozanam)

------- xxxx --------

PRI SKOLTA MOVADO

S-ano J.K.Hammer, ĝenerala sekretario de la Skolta Esperanta Ligo, el Nederlando, sendis al ni leteron en kiu li diras:

"Vi povas kompreni nian feliĉon, ke nun almenaŭ estas komenciĝo de bona organizado en via lando pere de Brazila Konsilantaro de Esperanto! Ĉar estas nia impreso, ke la Esperanto - Movado en Sud-Ameriko estas sufiĉe forta laŭ nombro kaj aktiveco, sed mankas nur la bona organizado!. La nuna situacio en Brazilo donas al ni novajn esperojn por pli bona estonteco, kaj kuraĝon por nia laboro. Ni esperas ke per ĝia ekzemplo, per ĝia influo, ankaŭ en aliaj landoj la situacio pliboniĝos.

S-ano Hammer miras, ke nia BKE ne kontaktis la skoltojn en Brazilo, tamen la reprezentantoj de la skolta movado en Brazilo estas grandparte niaj vicprezidantoj. Ekzemple:

1)-D-ro Veado
2)-Inĝ. Adonis M. Saliba - Silva
3)- Prof. Amorim Cardoso, ktp. krom s-anoj R.P. Burger kaj J. do Couto, kiuj estas niaj konatuloj.

La plej nova organizanto de la skoltoj en Brazilo estas nia vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho, el Caçapava(SP) pri kies laboro nia Bulteno jam informis.

Fine, s-ano Hammer apelacias jene:

"Bonvolu, mi petas, en via propra lando, en harmonia kunlaboro, fari la necesajn taskojn - Sud-Ameriko eble iam ludos gravan rolon en nia Ligo kaj Movado!

Alvoko!

Ni petas ĉiujn sinteresatojn rilate la skoltan Movadon skribi al la jena adreso:
SKOLTA ESPERANTA LIGO
Taxusstraat 7
ZAANDAM -(Nederlando) HOLANDA

BAURU (SP) - Nia vicprezidanto pri "Edukado", s-ano Euclydes G. de Carvalho, el Bauru, informis nin, ke en tiu ĉi jaro, en tiu progresiga urbo, funkcias du kursoj pri Internacia Lingvo. Unu ili estos gvidata de li mem kaj la alia, de s-ano Antonio J. Fraga Padilha. Ni deziras sukceson al niaj karaj kunlaborantoj.

Ke la Bauruanoj senlace laboras por nia idealo pruvas ilia klopodo sur diversaj kampoj.

Niaj vicprezidantoj organizis kaj harmoniigis la batalon por venkigi Esperanton. Ilia laboro estimitinda.

Nia kapabla vicprezidanto s-ano Euclydes Giraldes de Carvalho gajnis premion pri instruado en la konkurso organizita de nia vicprezidanto D-ro Jatir Gonçalves Vieira, en S.João da Boa Vista (SP).

------xxxxx------

RIO CLARO (SP)-Kiel ni jam informis, aperis nova libro de nia vicprezidanto D-ro Walter Augusto Francini, " Esperanto sem Preconceitos", kiu utilos al neesperantistoj por kompreni la valoron de Esperanto kaj al esperantistoj por argumenti efike, kaj pro tio la autoro de la libro intencas helpi al interesatoj.

La antaŭparolo, estis verkita de D-ro Erlindo Salzano, kaj San-Paŭlo Esperanto-Asocio ĝin eldonis.

Estas kuraĝiga fakto, ke S.P.E.A. havas kondiĉojn eldoni librojn.

La alia libro de D-ro W. Francini estas "Doktoro Esperanto". Ambaŭ estas troveblaj ĉe Livraria e Papelaria Esperanto Ltda.- Rua Líbero Badaró, 646 - Loia 3, Galeria S.Bento-S.Paulo

------xxxxxx-------

*PRECE DE AMOR*

*Como estiveres,*
*Deus te guarde.*

*Como penses,*
*Deus te use.*

*Onde te encontres,*
*Deus te ilumine.*

*Com quem estejas,*
*Deus te guie.*

*No que fizeres,*
*Deus te ampare.*

*Em todos os teus*
*passos,*

*Deus te abençôe.*

*EMMANUEL.*

(Página recebida pelo médium Francisco Cândido Xavier, em reunião da manhã de 30 de janeiro de 1975, em Uberaba, (Minas Gerais).

## CURSO DE ESPERANTO

### OITAVA LIÇÃO

Conjunções -As conjunções, como a sua própria denominação o diz, prestam-se para unir frases e partes de frases.

Ex.-Kaj - e; Sed- mas, porém; Nek...nek - nem...nem; Aŭ - ou; Tamen - todavia; Do - portanto; Ĉar -porque; Ja - de fato; Se - se; Ol- que, do que; Ĉu -não é traduzível, mas é indispensável seu uso nas frases interrogativas onde não fôr usada palavra interrogativa(pronome ou advérbio). Alguns exemplos:

Petro kaj Paŭlo - Pedro e Paulo; Johano iros sed mi restos - João irá mas eu ficarei; Nek mi nek vi perdos - Nem eu nem você perderá; Li aŭ ŝi solvos la problemon - Êle ou ela resolverá o problema. Etc.

Interjeções-As interjeções sao palavras ou locuções que soltamos instintivamente para exprimir um sentimento súbito de dor, de alegria, de repulsão, de admiração.

Ex.:-Ha! - Ah!; Ho! - Oh; Ĉu vere?-Verdade?-Etc-etc.

Alguns usos:

Ho! Kio okazas?!-Oh! Que acontece ?!

Ha! Estas tiel ke vi venkos?
-Ah! É assim que você vencerá? Etc., etc.

Afixos-Na formação das palavras Zamenhof adotou uma grande quantidade de afixos, isto é, prefixos e sufixos, os quais nos prestam grande ajuda, pois que com eles podemos, conhecido o radical, formar muitas palavras, mesmo - sem ajuda do dicionário.

Comecemos pelos

Prefixos - BO- para formar nomes de parentes afins: Patro - pai, Bopatro - sôgro; Filo - filho, Bofilo - genro. GE - para uniao de sexos:-
Filo kaj filino - filho e filha, Gefiloj -Filhos( o filho e a filha); Genepoj - nepo kaj nepino - netos, isto e, neto e neta.
FI - depreciativo: Homo - homen - Fihono - Um infame.
VIR para indicar masculinidade: Ĉevalo - cavalo, Virĉevalo- garanhão; Bovo - boi, Virbovo - touro ( reprodutor).

Estes sufixos são usados com substantivos.
MAL - indica o contrário, formamos os antônimos: Bela -belo, bela, Malbela-feio, feia.
NE-anulação: Varma- quente, Nevarma - frio; este prefixo e semelhante ao anterior.
EKS- que foi: Oficiro-Oficial, Eksoficiro-exoficial.

EL - ação completa até final: Lerni - aprender, Ellerni - estudar a fundo ; Pagi - pagar, Elpagi - liquidar. FIN - açao completada: Legi - ler, Finlegi ler até final; TRA- igual ao anterior: Tralegi -ler até o final; RE - repetição: Diri-dizer, Rediri - repetir o que foi dito,redizer; EK -começo de ação: Studi - estudar, Ekstudi- Começar a estudar; KUN - união de ação: Veni -vir, Kunveni-reunir; DIS-desuniao:Doni-dar, Disdoni - distribuir; SUB - estrago de ação, submissão: Aĉeti - comprar, Subaĉeti - subornar; AL, APUD, KUN-são semelhantes: Veni - vir, Alveni - chegar; Iri -ir, Apudiri-ir junto de;etc. FOR - para fôra: Iri- ir, andar, Foriri - sair; EN- INTER - entrada, de fóra para dentro: Iri-andar, Eniri, andar para dentro, entrar;: Meti - pôr, colocar: Intermeti - introduzir. DE - ponto de partida: meti-colocar, pôr, Demeti - tirar,depor;TRANS- além de, do outro lado de: Iri-ir,Trans-iri - ir para o outro lado.

Estes prefixos são usados com radicais verbais para formar novos verbos.

Na próxima lição teremos os Sufixos.

BAHAA ESPERANTO-LIGO

Poŝtkesto, 289
60.000 - Fortaleza (CE) -

---

JEN DEK DU FUNDAMENTAJ
BAHAAJ PRINCIPOJ:

La subaj fundamentaj principoj estas formulitaj de Bahá'u'llah' antaŭ pli ol centjaro. Oni povaa trovi ilin en Liaj libroj publikigitaj en tiu epoko.

1-Unueco de la homa speco.
2-Sendependa esploro de la vero.
3-La bazo de ĉiuj religioj estas nur unu.
4-Forigu de ĉiu ajn antaŭjuĝo
5-Religio estu kaŭzo de unueco.
6-Religio akordu kun scienco kaj racio.
7-Rajtoj egalaj por viro kaj virino.
8-Universala paco.
9-Universala edukado.
10-Spiriteca solvo de la ekonomiaj problemoj.
11-Universala helpa lingvo.
12-Internacia Tribunalo pri Justico.

Petu informojn pri Bahaa Religio al Bahaa Esperanto-Ligo. Supra adreso.

-----xxxxx---------

Brazila Esperanto-Ligo havas belajn plastikplaketojn por aŭtomobiloj po Cr$ 4,00- Adr.Praça da Republica,54-2º-ZC 14-20,000- RJ.